



# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Decembro : 2 2022

## ARGENTINA VICPREZIDANTINO KONDAMNITA PRO FRAŬDO EN PUBLIKAJ KONTRAKTOJ

Federala Kortumo kondamnis la argentinan vicprezidantinon Cristina Fernández de Kirchner al 6-jara enkarcerigo kaj dumviva malpermeso por okupi publikajn postenojn, pro la delikto fraŭdi la ŝtaton. Tamen, la tribunalo absolvigis ŝin rilate la akuzon pri kontraŭleĝa asociado.

La prokuroro petis 12 jarojn de enkarcerigo pro tiuj deliktoj, male la defendisto petis kompletan absolvon. Do, la juĝo troviĝas meze de ambaŭ petoj. Cristina Fernández ne eniros en la prizanon, ĉar aganta vicprezidanto ĝuas tiun privilegion. Rilate la dumvivan malpermeson okupi publikajn postenojn, ŝi rajtas apelacii antaŭ la Supera Kortumo de Argentino, kies definitiva juĝo prokrastiĝus dum kelkaj jaroj.

Laŭ la tribunalo, Cristina Fernández ricevis kontraŭpagon de konstru-entreprenisto, tre bona amiko de la eksprezidanto Nestor Kirchner (1950-2010), edzo de la vicprezidantino. Laŭ informoj prezentitaj de la prokuroro, entreprenisto Lázaro Báez atingis tre



rapide kontraktojn kun la argentina administracio. Tiel, averaĝe kontraktoj kun aliaj entreprenoj bezonis 210 tagojn por perfektigi, tamen tiuj de la konstru-entreprenisto Báez nur 29 tagojn. Poste nur la duono el la kontraktoj subskribitaj kun tiu entreprenisto finiĝis kun la laboro plenumita, kvankam la ŝtata administracio pagis la paktitan prezon. Multaj el tiuj laboroj eĉ bezonis kromajn pagojn por atingi kompletan finon de la konstruaĵoj.

La tribunalo sciigis, ke la agadoj de la vicprezidantino damaĝis la interesojn de la nacia administracio. Tiel, la fraŭdita mono leviĝas al 1.000 milionoj da dolaroj inter la jaroj 2007 kaj 2015, kiam ŝi estis prezidanto de Argentino.

# Vorto de la Semajno

## Bonfide (adv.):

Ĝenerala jura principo laŭ kiu, la agadoj de ĉiu homo okaze de jura negoco aŭ transakcio, realiĝas akorde al vereco kaj honesteco.

Sinonimoj: *Fidele, ĝuste, sincere.*

*La vendisto bonfide cedis la proprieton de sia domo, ĉar li tute ne sciis, ke antaŭ kelkaj jaroj banko registris embargon sur la ĉirkaŭa bieno.*



The poster features the logo of the Universal Esperanto Association (UEA) in the top left corner, consisting of a colorful square divided into four quadrants (yellow, red, blue, green) with the text 'Universala Esperanto-Asocio' and 'uea' below it. To the right is the hashtag '#HomrajtaTago'. The main title 'Tago de Homaj Rajtoj' is written in large blue letters, with the date '10 decembro 2022' below it. The slogan 'Digno, Libereco kaj Justeco por ĉiuj' is written in green, stacked vertically. A large blue hand icon is positioned in the bottom right corner, with fingers spread.